

# 14-a Esperantista Migrado Aŭtuna EMA 2026

*18-a ĝis 23-a de oktobro 2026 (dimanĉo ĝis vendredo)*

*en Naundorf apud Stadt Wehlen „Saksa Svisio“ / Elbsandsteingebirge*

© Gerald Roemer

# Programo kaj loko

Ĉiutagaj migradoj en la unika pejzaĝo de la limregiono Saksa kaj Bohemia „Svisio“ (Sächsisch-Böhmische Schweiz/Elbsandsteingebirge) – en unu de la plej okulfrapaj naturregionoj de Eŭropo. La mult- kaj ofte strangforma sabloŝtona montaro estas paradizo por naturamantoj, kulturintersitaj homoj, migrantoj. Antaŭĝoju pri pentrindaj kaj ofte pentritaj pejzaĝoj apud la rivero Elbe/Labe, kun riĉa historio kaj multflankaj kulturaj ofertoj. La senlimaj migradvojoj kun vizito de naturaj kaj historiaj vidindaĵoj estos neforgeseblaj travivaĵoj.

Detala programo: **www.esperanto.de/ema**

La programo estas provizora kiel dum ĉiuj migradoj, dependas de la aktualaj kondiĉoj, ekz. la vetero. Publikaj trafikiloj estas oftaj, kelkfoje ni uzos ilin. Vespera programo okazos kun kontribuoj de la partoprenantoj. Bonvolu anonci ĝin al la organizanto.

## Necesa sporteca kapablo

Ĉiutage ni migros proksimume de la 9-a ĝis la 17-a horo – kun paŭzoj. Estos facilaj, mezfacilaj, kelkfoje malfacilaj etapoj. Oni kapablu iri distancon de ĉ. 12 – 15 km kun altodiferencoj ĝis 350 metroj.

## Naundorf (komunumo Struppen) / Stadt Wehlen

Tiuj du lokoj situas ambaŭflanke de la rivero Elbe/Labe, ĉirkaŭ 30 km sudoriente de Dresden. Ili estas bone atingeblaj de Dresden per la laŭlonge de la valo veturanta „S-Bahn“. Trajnoj el Ĉeĥio haltas en Bad Schandau, tie eblas ŝanĝi al „S-Bahn“.

www.struppen.de
www.saechsische-schweiz.de

# Nia tranoktejo kaj kostoj

## Nia tranoktejo

La familia kaj kleriga ejo „Familienferienstätte St. Ursula Naundorf“ de la „Caritas“ situas unu kilometron de la S-trajnohaltejo „Stadt Wehlen“, apud la vilaĝo Naundorf ĉ. 100 metrojn super la rivero Elbe / Labe, kun rigardo al la valo. Ĝi havas plurajn domojn sur granda tereno. Ofte du ĉambroj havas komunan duŝon / necesejon, kelkaj havas propran. Migradvojoj komencas tuj apude.

**Familienferienstätte St. Ursula Naundorf**
Sankt-Ursula-Weg 24
01796 Struppen / OT Naundorf
Tel. +49 35020-756 100
Interreta paĝo: www.ferien-naundorf.de

| **Kotizoj** por unu persono | ĝis 2026-03-31 | ĝis 2026-06-30 | „malfruaj birdoj“* |
|---|---|---|---|
| **2-lita ĉambro** (2 haveblas) | 410 € | 430 € | 450 € |
| **1-lita ĉambro;** komuna necesejo kune kun alia ĉambro (8 haveblas) | 490 € | 510 € | 530 € |
| **1-lita ĉambro;** kun propra necesejo (2 haveblas) | 530 € | 550 € | 570 € |

* 2026-07-01 ĝis 2026-08-15

La kotizo inkluzivas 5 tranoktojn kun matenmanĝo, 5 vespermanĝojn, 4-foje provianton survoje, veturadon ene de la regiono Saksa Svisio (krom pramoj). Aliĝon por 2-lita ĉambro ni taksos kiel aliĝo por 1-lita ĉambro, se vi/ni ne trovos kunulon aŭ kunulinon por la ĉambro.

**Rabato** de 30 € por ordinaraj membroj de Germana Esperanto-Asocio kaj por homoj, kiuj ne loĝas en Germanujo

# Aliĝo kaj kontakto

Via aliĝo ekvalidos post atingo de la antaŭpago de minimume 50 € po persono sur la konto de

> Deutscher Esperanto-Bund Berlin
> Sparkasse Odenwaldkreis
> IBAN: DE32 5085 1952 0040 1145 71
> BIC: HELADEF1ERB

Sur la ĝirilo indiku kiel koncernon:
„EMA 2026“ + via familia nomo

**Vi pagu eventualan reston ĝis 2026-06-30.** Por la „malfruaj birdoj“ la aliĝo ekvalidos nur per la pago de la plena kotizo.

**Malmendo:** La antaŭpago de 50 € ne estos repagata, sed vi povas peri anstataŭanton. Ni aldone fakturos la eventualajn kostojn de malmendo laŭ la kondiĉoj de la tranoktejo (AGB 2026 en www.ferien-naundorf.de/preise/).

Per via aliĝo vi eksplicite deklaras vian konsenton kun tiuj ĉi kondiĉoj.

## Maksimuma nombro de aliĝoj:

**14** – pliajn aliĝojn ni devos interkonsenti kun la tranoktejo.

## Bonvolu aliĝi elektronike:

**en la interretaj paĝoj: www.esperanto.de/ema**

## Organizanto / kontakto:


> Gerald Roemer, Hamburgo, Germanio
> Telefono: +49 800-336 36 36-66 (ene de Germanio)
> Retpoŝte: ema@esperanto.de


© Germana Esperanto-Asocio r.A. 2026